

196-191  
STIFIS

**El la enhavo:**

Ŝanĝo de la asocia adreso  
7-a konferenco en Znojmo  
Israelaj impresoj  
Esperanta Simfonio  
Strategia plano de UEA  
OSIEK en Strážnice 2001  
Informoj por UK Zagreb  
53-a IFEF-kongreso en Tábor  
Orienta politiko de Vatikano

5=6  
2000

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



**TÁBOR (CZ)  
2001-05-12/19**

**53-a kongreso de IFEF  
la duan fojon en Ĉeĥio  
Tábor 2001-05-12/19**

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 6-foje jare. Abono 9 eŭroj (se aerpoŝte: + 2 eŭroj). **rete Starto:** starto@clavis.cz, www.clavis.cz/starto, **rete ĈEA:** cea.polnicky@quick.cz (sekretario) podhradska@volny.cz (prezidanto) www.kuk.cz/cea/

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 200 Kč, B 100 Kč, D 50 Kč, E 50 Kč, F 4000 Kč, G 130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 490 Kč komentoj, 450 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 152 00 Praha, tel. 02/5817732, m.pluharova@worldonline.cz

**Sekcioj de ĈEA:** junulara, skolta, pedagogia, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, de esperantaj-kolektantoj, pri informatiko

**Komisionoj de ĈEA:** gazetara-informa, ekzamena

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 0324/615651, cea.polnicky@quick.cz

**IĈO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:**  
3330-021/0100, Komerční banka  
Poděbrady

## Komitato de ĈEA:

**Prezidantino:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 05/4323 3047, podhradska@volny.cz (eksteraj rilatoj, honoraj membroj, E-muzeo)

**Vicprezidanto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 02.9912201, fakso 02.9912126 chrdle@kava-pech.cz, (eldonado, UEA, subvencioj),

**Vicprezidanto:** Jan Řepa, Na Valše 250, 384 11 Netolice (sekcioj), repasyn@iol.cz

**Sekretario:** Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, telefono. 0324/615651, cea.polnicky@quick.cz (kontado, membrobazo)

**Kasisto:** Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha (konferencioj, seminarioj)

**Komitatano:** Zdeněk Heiser, Na nábreží 45/25, 736 01 Havířov, tel. 069/6815253 (EK, kulturo)

**Komitatano-ĉefdelegito de UEA:** Lucie Karešová, Tylova 1262, 508 01 Hořice v Podkrkonoší (protokolado, junulara sekcio)

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, Libuše Krejčí, Školní 693, 789 61 Bludov

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724 0690 (nesignitaj artikoloj estas liaj), starto@clavis.cz

**Lingva kontrolo:** Miloslav Pastrňák  
**Esperanto-muzeo:** Jiří Pištor, Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová

**Abonoj de gazetoj:** Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, tel. 0631/332 278, fakso 0631/332 507, vlada\_hasala@iol.cz

**ISSN 1212-009X**

## NEPŘEHLÉDNĚTE

Během konference ve Znojmě a po ní došlo k několika závažným změnám, na které Vás chceme upozornit.

### Nový tajemník svazu a nová svazová adresa:

Dosavadní tajemnice Květa Krajíčková odstoupila z funkce, proto byl kooptován jako nový tajemník Pavel Polnický z Poděbrad, který zároveň bude obhospodařovat svazové účetnictví, vést přehled členské základny a vyzvedávat svazovou poštu. Proto se jeho adresa stala i adresou svazovou.

#### ČESKÝ ESPERANTSKÝ SVAZ

c/o Pavel Polnický

Lesní 150/VI

290 01 Poděbrady

tel./fax: 0324/615651,

mail:cea.polnický@quick.cz

(Zkratka c/o v poštovním styku znamená, že se jedná o korespondenční adresu organizace.)

### Svazový účet

Také svazový účet se přesouvá z Prahy do Poděbrad, avšak číslo účtu zůstává nezměněno: -

3330-021/0100, Komerční banka  
Poděbrady

### Hlavní delegát UEA

Hlavním delegátem UEA pro naši republiku je členka výboru Lucie Karešová, jejíž adresu najdete v záhlaví

Starta mezi členy výboru.

### Internetové adresy

S mnoha funkcionáři svazu lze komunikovat také již elektronickou poštou:

**Předsedkyně Věra Podhradská:**

podhradska@volny.cz

**Tajemník Pavel Polnický:**

cea.polnický@quick.cz

**Místopředseda Petr Chrdle:**

chrdle@kava-pech.cz

**Místopředseda Jan Řepa:**

repasyn@iol.cz

**Vedoucí Libroserva Zdeněk Pluhař:**

m.pluharova@worldonline.cz

**Zprostředkovatel předplatného časopisů Vladislav Hasala:**

vlada\_hasala@iol.cz

**Vedoucí písemných kurzů a pedagogické sekce Jana Melichárková:**

melicharkova@quick.cz

**Redaktor Starta Miroslav Malovec:**

starto@clavis.cz

### Starto v roce 2001

Vzhledem ke zvýšeným poštovním poplatkům budou od příštího roku vycházet jen 4 čísla, ale s větším počtem stran, takže celkový počet stran za celý rok bude stejný jako dosud.

### Konference na rok 2001

S 8. Konferencí ČES počítáme na podzim roku 2001, ale zatím nemáme místo. Žádáme ty kluby, u nichž by byly vhodné podmínky, aby tajemníku nebo předsedkyni svazu zaslali své nabídky.

## Ni konferencis en Znojmo

En mezlernejo de Znojmo efektiviĝis la 7-a konferenco de ĈEA (13/15 okt. 2000) kun 86 reprezentantoj de E-kluboĵ. Antaŭ la konferenco venis tri redaktoroj de gazetoj kaj televido por gazetara konferenco. La konferencanoj vidis video-filmon pri UK en Tel-Avivo kaj plantis Esperanto-arbon en ĝardeno de Domo de Infanaro kaj Junularo, kies direktorino salutis la konferencon, same kiel la vicurbestro. En la urba arkivo kaj en la lernejo estis instalitaj ekspozicietoj pri Esperanto, kie tie restos ankaŭ post la konferenco.

La konferenco pritraktis la faritan laboron dum la lasta jaro kaj planojn por la venonta jaro (maja IFEF-kongreso en Tábor, jubilea E-tendaro en Lančov k.s.). Okaze de la konferenco aperis nova bildkarto pri Znojmo kun tekstoj en Esperanto, alia E-bildkarto pri 100 jaroj de Esperanto en Brno festota en majo 2001.

*mm*

## Organizaj ŝanĝoj

Certe vi rimarkis, ke en nia asocio okazis kelkaj organizaj ŝanĝoj..

**Nova kontisto kaj sekretario.** De la 1-a de oktobro la asocio havas novan kontiston, nome Pavel Polnický, kiu ankaŭ trans-prenis membraran agendon. S-ano Květa Krajččková rezignis je sekretario kaj restis kiel komitatano. La 18-an de novembro dum komitata kunsido ŝi rezignis ankaŭ je funkcio de komitatano. Laŭ nia Statuto estis kooptita kiel komitatano s-ano Pavel Polnický, kiu estis komisiita esti sekretario.

**Nova banko-konto.** Samtempe ni

ŝanĝis banko-konton - anstataŭ Praha 2 - Poděbrady. La numero mem sen ŝanĝo.

### **Novaj asociaj adreso kaj ret-adreso.**

La adreso kaj ret-adreso de la nova sekretario fariĝis ankaŭ asociaj. Mi petas, uzu ilin, por ke Viaj postuloj, proponoj, rimarkoj k.s. estu frue solvitaj. Denove mi atent-igas, ke Vi povas turni Vin al tiu komitatano, kiu por certaj aferoj respondas (vidu paĝon 2). La asocio havas nenian oficejon, ĉiu komitatano oficas hejme, libervole, sed tre volonte.

**Korespondaj kursoj.** La aliĝojn akceptas la prezidantino de la pedagogia sekcio Jana Melichárková.

**Starto.** Plua ŝanĝo estos eldonado de STARTO. Ĉar de jaro 2001 denove altiĝas la poŝtaj prezoj, kaj ni ne volas altiĝi prezojn de STARTO, komitato decidis, ke ni eldonos STARTO n 4-foje en jaro, sed sumo de paĝoj estos la sama.

**Venonta konferenco.** Kiel Vi scias, lasta konferenco okazis en Znojmo. Sed pri venonta konferenco ne estas ankoraŭ decidite. La komitato petas tiujn niajn Esperanto-kluboĵn, en kies urboj estus oportunaj kondiĉoj por organizi konferencon, bonvolu aliĝi aŭ ĉe sekretario aŭ ĉe prezidantino. Ni denove kalkulas, ke konferenco okazos oktobre aŭ novembre 2001.

La tuta komitato dankas al ĉiuj, kiuj kontribuis por disvastigi ideon de Esperanto, kaj deziras al ili por la nova milenio multajn sukcesojn en la laboro kaj persona vivo.

*Věra Podhradská*

## Israelaj Impresoj

Kiam ni konstatis, ke neniu en nia lando organizas komunan vojaĝon al Universala Kongreso de Esperanto en israela Tel-Avivo, ni decidiĝis partopreni la kongreson pere de E-turisma agentejo Penelopa el Varsovio. Ĝi ofertis kvalitan programon, celitan ĉefe al funda ekkono de la kongreslando dum preskaŭ du-semajna vojaĝo tra Israelo.

Estas vero, ke ĉifoje estis la kongreso iomete "en la fono", sed ni finfine konsentis kaj preferis tion, ĉar estis por ni pli grave kaj interese ekkoni t.n. Sanktan Landon, precipe en Jubilea Jaro 2000.

Trajne atingitan Varsovion ni iomete trarigardis kun nia pola esperantista amiko. Nokte nia E-grupo kune forflugis al Tel-Avivo. Tie atendis nin tre sperta kaj kompetenta loka ĉiĉerono kaj klimatizita mikrobuso, kiu englutis nian nur 12-kapan E-karavanon.

Dum nia vojaĝo ni busĉare travojaĝis relative malgrandan Israelon kaj ni vizitis plejparton da vidindaĵoj, memorindaĵoj kaj naturbelajoj, videblaj en la lando, kiuj estas superbaj ĝenerale kaj valoraj precipe por kristanoj, sed ankaŭ por aliaj religianoj. Nia vojaĝo inkluzivis multe da lokoj fame konataj el Biblio; ni vizitis eble mil plejdiversajn preĝejojn, bazilikojn, katedralojn aŭ moskeojn.

Ni tranoktadis en kelkaj urboj ĉiam en plurstelaj, perfekte ekipitaj hoteloj kun certigitaj maten- kaj vespermanĝoj. Manĝaĵoj mem estis ĉie je alta nivelo, senriproĉaj kaj pri ilia bunteco, kvalito kaj kvanto estus eble paroli sufiĉe longtempe!

Pro granda varmeco estas en Israelo eble ĉiuj vendejoj, hoteloj, publikaj spacoj, eĉ transportiloj efike klimatizitaj. Komercistoj scipovas oferti kaj vendi siajn varojn, sed por meznivela nialandano estas tie multekoste.

Estas neeble nomi kaj memori ĉiujn vizititajn lokojn dum nia preskaŭ 2500 km longa vojaĝo tra Israelo, nur iujn.

De flughaveno Ben Gurion ĉe Tel-Avivo ni vojaĝis norden tra romia "Via Maris", kunliginta tiaman Egiption kun Asirio, al Netanio, kie ni vizitis fabrikejon de diamantaj juveloj, plue ni direktiĝis al Cesareo, ĉemara havenurbo kaj iama ĉefurbo de romia provinco Palestino, konstruita de Herodo la Granda. Vizito de romia amfiteatro, akvodukto kaj kruckavalira fortikaĵo impresis nin. Ni daŭrigis al Hajfo, kiu estas industria centro, troviĝanta ĉe monto Karmel (Vitejo de la Sinjoro), por vidi unikan panoramon de la urbo kun haveno, memorindaĵojn kaj por viziti unu el dominaĵoj de Hajfo - religian templon de Bahaa Monda Centro kun ĝiaj nepriskribeble belegaj pendantaj ĝardenoj.

Veturante norden ni atingis antikvan urbon Akko, menciitan jam en Malnova Testamento. Ĝi atingis sian apogeon dum periodo de kruckavaliroj kaj estis iama ĉefurbo de la regno. La urbo estas ĉirkaŭita de antikvaj fortikaĵoj kun remparo Al-Jasara kun moskeo de la sama nomo. En jaro 1799 la urbon sieĝis Napoleono sensukcese.

Tra Nazareto ni atingis urbon Tiberiadi apud Galilea Lago, kie ni estis loĝigitaj kaj entreprenadis ekskursojn en ĉirkaŭaĵoj. Ni boatis tra Galilea Lago kaj iris post spuroj de Jesuo Kristo al Kaper-naumo, centro de lia agado en Galileo, vizitis restaĵojn de antikva sinagogo el periodo de la Dua Templo kaj domon de Sankta Petro.

Ni daŭrigis al Tabgha, loko, kie Jesuo mirakle satigis 5 mil homojn per kvin panoj kaj du fiŝoj, tie ni vizitis bazilikon Plimultiĝo de Pano kaj Fiŝoj, preĝejon de Unuarangeco de Sankta Petro, monton kaj preĝejon Beateco (okangula preĝejo simbolanta ok beatecojn el Prediko sur la Monto). Norde de Galilea Lago troviĝas Golana Altebenajo, strategie valora teritorio por Israelo.

Kiam nia leteramiko el Israelo eksciis, ke ni vizitos Universalan Kongreson en Tel-Avivo, li invitis nin al sia hejmo, proksime de Hajfo. Ĉar nia programo estis plenigita per treege interesaj ekskursoj, vizitis nin finfine li mem kun sia edzino kaj filino en nia hotelo Astoria en Tiberiadi. Estis tio nia unua persona renkontiĝo, dum kiu ni pli ekkonis nin kaj pli amikiĝis. Ni interbabilis eble kvar horojn. Kiam li aŭdis, kiom da lokoj ni jam vizitis (kaj kiom ankoraŭ vizitos), li diris, ke li mem ĉiujn lokojn ne vidis, kvankam li vivas tie pli ol 25 jarojn!

Plua vizitita loko estis Yardenit, loko de baptaj ceremonioj en la rivero Jordano kaj Nazareto, hejmo de Maria, Jozefo kaj Jesuo, kie troviĝas baziliko de Anun-ciacio, preĝejoj de Sankta Jozefo kaj Sankta Gabrielo. En ne malproksima

vilaĝo Rana, kie Jesuo dum edziĝfesto faris vinon el akvo, estas bela preĝejo de Miraklo.

Direkte al Tel-Avivo ni vizitis monton Tabor kun vere monumenta Baziliko de Transformiĝo de Kristo. Suprenkondu-kanta ŝoseo tiel serpentumas, ke ne estis eble atingi pinton eĉ per nia buseto. Tial ni devis uzi du pli grandajn personajn taksiojn. De sur la montosupro aperis antaŭ ni neforgesebla panoramo.

Kongresurbo Tel-Avivo estas tiea plej moderna urbego, centro de komerco, kulturo kaj distro, vivanta vere senpaŭze. Malnova Jafo estas ĝia ununura antikva kvartalo, funkcianta kiel havenurbo jam antaŭ 4 mil jaroj. Nia hotelo estis relative proksime de kongresejo, kiu estis lokigita en granda hotelo Dan Panorama.

Ni kongresumis nur dum du-tri tagoj kaj ni renkontis iujn amikojn aŭ konatojn, ekkonis la novajn, interŝanĝis kaj aĉetis esperantajojn. Ĉi-jare vizitis la kongreson nur 1202 kongresanoj el 57 landoj. Ŝaj-nas, ke pluraj interesitoj rezignis pri partopreno de la kongreso pro timo el eventualaj maltrankvilaj interetnaj, sed superflue, ĉar regis ĉie paco kaj trankvilo, kiel promesis organizintoj.

Laŭ nia opinio estis la kongreso bone organizita iomete "hejmeca", kiu ĝenerale plaĉis. Iun mankon tamen ĝi havis - specialan kongresan poŝtstampon ne estis eble ricevi dum la tuta kongresa semajno (kiel kutime), sed nur ĝis jaŭdo, do nur dum unuaj tri tagoj, poste ne. Laŭdire pro postulo de loka poŝtofico.

La Tel-Avivon ni ekkonis perbuse kaj perpiede, ni banis nin en Mediteranea Maro dumtage, sed eĉ nokte, ja nia hotelo Imperial troviĝis preskaŭ ĉe strando.

Dum nia plua ekskurso ni vizitis Latrunon, trapistan monaĥejon, kie oni produktas (kaj vendas) altkvalitajn vinojn, likvorojn kaj olivoleon, Bejt Jamal, kie troviĝas tombo de Sankta Stefano, la unua diakono kaj martiro, Emaus kun antikvaj elfosaĵoj, Novan Jerusalemon, kie ni estis enloĝigitaj dum kelke da tagoj. Ni funde traveturis, trairis la grandiozan urbon Jerusalemon kun ĝiaj memorindaĵoj kaj ankaŭ vizitis plurajn interesajn lokojn en ĉirkaŭaĵo per nia klimatizita mikrobuso.

Ni vizitis faman urbeton Betlehemon (troviĝantan preskaŭ apud Jerusalemo), kie tronas historie kaj religie valora Baziliko de Naskiĝo, kies parto estas Groto de Naskiĝo, enhavanta altarojn de Krista naskiĝo, Kribo kaj Saĝuloj. Per reto de subteraj koridoroj eblas atingi preĝejon de Sankta Katarino, kiu estas fama interalie, per ĉiujaraj solenaj rom-katolikaj noktomezaj mesoj, transsendata pere de satelito al la tuta mondo. Meze de apuda monaĥejo troviĝas kolono kun statuo de Sankta Jeronimo, klerulo, kiu laŭ tradicio dum siaj lastaj 35 jaroj en iu el tieaj grotoj tradukadis al latina lingvo la Bibliion, t.n. Vulgaton.

En Jerusalemo ni veturis rekte al Monto Oliva, de kiu aperis antaŭ ni unika panoramo de la Malnova Urbo, ĉirkaŭita de antikvaj muregoj kun 7 famaj pordegoj kun Templo-Monto. Moskeoj Omara kaj El-Aksa estas la tria plej sankta loko por islamanoj (post Mekko kaj Medino). Monumenta konstruaĵo kun ora kupolo -

moskeo de Omar (ankaŭ Roka Templo) estas vera dominaĵo de la urbo, troviĝanta sur biblia monto Moriah. Belega kaj efikema estas elrigardo de ne granda, sed bela franciskana preĝejo Dominus Flevit.

Okcidente, sub Roka Templo, staras t.n. Murego de Lamentoj, la lasta relikvo de la Dua- Templo, detruita de romianoj. Ĝi estas la plej sankta loko por judoj. Tuj apud la Murego estas grotta biblioteko de judaj sanktaj libroj.

Inter Oliva Monto kaj Malnova Urbo troviĝas valo kun rivereto Cedron, preskaŭ senarba, havanta montetan karakteron, kun pluraj kriptoj. Preĝejo de Sankta Petro aspektas moderne. Verŝajne ĝi troviĝas sur loko de iama domo de ĉefpastro Kajafas.

En 15-a jc., kiam muzulmanoj regis monton Cion, estis tiama preĝejo transformita al moskeo, kien dum 5 jarcentoj ne estis al kristanoj permesita aliro. Pri tiu loko, sankta por kristanoj, oni supozas, ke ĝi estas la loko, kie Jesuo kaj liaj disĉiploj manĝis t.n. Lastan Vespermanĝon. Plua menciinda loko de la monto Cion estas Tombo de Reĝo Davido.

Vizitinte preĝejon Patro Nia, kie Jesuo instruis al siaj disĉiploj la preĝon "Patro nia" kaj aŭguris la detruon de Jerusalemo, ni trovis esperantlingvan tabul(eg)on kun la fama preĝo. Ĉirkaŭe estas aliaj tabuloj diverslingvaj (ankaŭ ĉeĥa). Rande de Jerusalemo, en vilaĝeto Ejn Kerem - naskiĝloko de Johano Baptisto - troviĝas preĝejo de la sama nomo, en kies korto ankaŭ estas E-lingva tabulo kun preĝo (Benedictus, Benita).

Idilia estas Getsemana ĝardeno, ĝis nun plena de praaĝaj olivarboj, kiuj eble estis atestantoj de lasta nokto de Jesuo antaŭ lia arestigo. Nun en ĝi troviĝas Baziliko de Agonio aŭ ankaŭ nomata Baziliko de Ĉiuj Nacioj en eleganta klasicisma stilo, simbolanta kontribuadojn de multaj nacioj por ĝia konstruo.

Baziliko Forpaso de Virgulino Maria (Endormiĝo) estas ankaŭ konata kiel Ĉielpreno de Virgulino Maria. En suba roka kriptoj troviĝas restaĵoj de gepatroj de Maria kaj ankaŭ de ŝia edzo Jozefo. Ĝiaj internaj kaj ekipo estas tre riĉaj kaj belaj.

Proksime estas Groto Getsemana, en kiu oni arestis Jesuon post perfido de Judaso. Ĝi enhavas tri altarojn kun surmuraj pentraĵoj. Fortega kaj impona fortikaĵo de citadelo estas finita per pinaklo, turoj kaj minareto, malĝuste nomigita Turo de Davido. Dum nia restado estis en la tuta ĝia spaco aranĝita belega ekspozicio de artvitraĵoj, nokte iluminita.

Ni promenis tra rekonstruita malnova juda kvartalo, kies pitoreskaj stratetoj estis plenaj de lokaj komercistoj pluretnaj kun abundo de plejdiversaj varoj kaj

artaĵoj. En bazaroj estas aĉetebla preskaŭ ĉio kaj ĉie torentas turistoj.

Oni eĉ ne konscius, ke en la lavango de la varoj en la stratetoj troviĝas unuaj 9 haltigoj de la Vojo de Doloroj (Via Dolorosa), kiun mortkondamnita Jesuo laŭiris ekde Fortikaĵo Antonia ĝis Golgota, portante pezan krucon. La haltigoj, komenciĝantaj apud Templo de Vipado, estas signitaj jen per surskribo au reliefo, jen per kapelo. Lastaj kvin haltigoj nun troviĝas sub impona ampleksa templo-komplekso Preĝejo de Dia Sepulitejo (aŭ Baziliko de Sankta Tombo), kie estis Jesuo entombigita - eble la plejsankta loko por kristanoj. La centron de la baziliko kun granda kupolo oni laŭ kristana tradicio opinias "Umbiliko de la mondo". En la komplekso estas kelke da kapeloj (ekz. de Sankta Heleno, Adamo, Anĝelo, Kopta, Franciskana), altaroj de Krucumado, Najloj de la Kruco, Stabat Mater, Sankta Arestejo, eĉ tombo de Jozefo el Arimatio.

El multaj preĝejoj en Jerusalemo estas menciindaj ekz. rusa katedralo de Sankta Triunuo kun verdaj kupoloj aŭ templo de Sankta Maria Magdaleno, troviĝanta en deklivo de Olivmonto. Ĝi estas tipe "Moskva", kun 7 oraj cepoformaj kupoloj, plue preĝejo de Sankta Marko kaj katedralo de Sankta Jakobo.

Krom veturo al Israela Parlamento (Kneset) ni vizitis Jed Vašem, la faman memorigejon, dediĉitan al ses milionoj da judoj, pereigitaj en la Holokaŭsto (Genocido) dum la dua mondmilito.



Dum nia vizito ĉeestis ankaŭ kompanio de Israela armeo sub ina komando (estas konate, ke en Israelo estas trijara deviga militservo, ankaŭ por virinoj).

El Jerusalemo daŭris nia vojaĝo tra Judea Dezerto (kie ni vidis k.a. rokan urbeton, troviĝantan en roka profundaĵo) al Jeriĥo, plue al Kumrano, kie en la jaro 1947 beduena paŝtisto malkovris hazarde la Skribrulaĵojn de la Morta Maro. Veturante laŭ kibuco Kalia al Morta Maro, ni atingis nivelon pli ol 400 m sub marnivelo - la plej malaltan lokon sur la Tero.

Ni tranoktis en En-Bokek apud Morta Maro, kie ni banis nin, naĝis kaj konvinkigis, ke ĉio, kion ni iam legis pri Morta Maro, estas vero. Ĉar en tiu ĉi regiono estas ĉiam pli varme ol aliloke je 5-8°C, estas eble diri (nur kun eta troigo), ke la temperaturo de la akvo preskaŭ kaŭzis nian brogvundiĝon. Ankaŭ akvo de granda hotela bazeno ne tro refreŝigis nin, eĉ nokte. Sed restado en efike klimatizita hotelo kun ĉiuj ĝiaj ekipaĵoj estis pli ol agrabla.

Ni ankaŭ vizitis grandan tiean fabrikejon, kie oni produktas diversajn kosmetikajn varojn de fama marko Ahava. El Morta Maro oni kondukas kanalon al fabrikejo, kiu prilaboras ĉ. 38% da mineraloj enhavataj en la akvo, kiu post eluzo estas kondukita revonen.

Veturante laŭ marbordo ni atingis fortikaĵon Masada, kiu troviĝas sur nesurgrimpebla monto kun krutaj deklivoj. Masada estas la lasta juda bastiono, kiu kontraŭstaris la romianojn

post la detruo de la Dua Templo kaj Jerusalemo (jaro 70 p.K.). La romianoj post longa sieĝo sukcesis surgrimpri kaj konkerti la fortikaĵon nur dank' al genia ideo konstrui ramplon el tero ĝis la supro. Tiam okazis unu el la plej dramaj epizodoj en la juda historio, kiam 960 sieĝitoj decidis mortigi sin anstataŭ sklaviĝi. Masada estas simbolo de nacia heroeco de judoj.

Ni supreniris la monton per telfero, vizitis la fortikaĵon kun ĝiaj antikvaj (rest)konstruaĵoj. Supre aperis antaŭ ni impona panoramo - antaŭ ni Morta Maro kun montaro de apuda Jordanio en la fono, malantaŭ pitoreskaj diversformaj montoj kaj valoj.

Nia vojaĝo direktiĝis suden tra Negeva Dezerto en ampleksan nacian parkon Timna, kie elstaras el dezerto majesta belega montaro. Ni povis admiri fantaziajn diversformajn rokojn kaj montojn (ekz. boletforman), nokte eĉ lumigitajn. Por detale trarigardi la nacian parkon estus necesaj eble kelkaj tagoj, tiel ni povis viziti nur ĉefajn naturbelajaĵojn. Eĉ en tiu ĉi dezerta loko ni renkontis samlandanon, kiu laboris en oazo (dum nia restado en Israelo ni renkontis tri samlandanojn, kompreneble krom la UK).

Poste ni atingis la plejsudan parton de la lando - urbon Ejlal ĉe Ruĝa Maro, turisman centron, troviĝantan tuj apud limoj de Egiptio (Sinaj) kaj Jordanio (ĉe urbo Akaba). En Ejlal estas multe da plurstelaj hoteloj perfekte ekipitaj kaj hotelo Dortel Sol iĝis dum tri tagoj nia hejmo

Ni jen banis nin en la Ruĝa Maro aŭ en hotela baseno, jen ekkonadis la urbon. Interesitoj vizitis faman delfenaron por vidi nekredeble belegan kaj buntan vivon de la submara mondo.

Al Tel-Avivo ni revenis per alia buso tra Negeva Dezerto, travojaĝinte la plej grandan krateron de la mondo (diametre ĉ. 35 km) kun ĉeranda observatorio.

La organizantoj preparis por ni surprizon - viziton de nomadaj beduenoj en dezerto. Post bonvenigaj salutoj ni kuŝiĝis sur tapiŝojn kaj kapkusenojn, lokiĝitajn sursable sub tendego kun agrabla aerumado. Beduenoj rakontis pri sia mal-facila vivo, kantis ludante nekonatan kordan instrumenton. Refreŝigis nin mal-varmega oranĝa suko, kafo kaj teo. Ni vespermanĝis tipan flanan panon (je diametro almenaŭ de tri kvaronoj de metro), tre bongustan ŝafajon kaj rizon kun diversspecaj legomoj. Ni sukcesis manĝi apenaŭ kvaronon. Virinoj admiris broditajn kostumojn, en kiuj ili eĉ fotis sin. En la tendejo ni restis pli ol tri horojn kaj post adiaŭo ni forveturis tra urbo Berŝeba al Tel-Avivo.

Forflugante ni admiris lumigitan Tel-Avicon, sed proksimiĝante al Varsovio, jam tagiĝis. Post adiaŭo kun niaj polaj geamikoj ni trajne atingis Prostějov.

Niajn travivaĵojn kaj impresojn povas rememorigi ankaŭ ricevitaj diplomoj (subskribitaj de pola ministro de turismo kaj urbestro de Jerusalemo), konfirman-taj, ke ni estas rajtigitaj uzi titolon "Pilgrimanto de Jerusalemo" en la jubilea jaro 2000.

*Geedzaj Milan kaj Věra Smělý*

## Verne kaj Esperanto

Plume de *Delcourt-Amoureux* (1977, re-presite en 1987) mi legas: "Jules Verne en sia romano *Dudek mil mejloj sub la maroj* (mi aldonas, ke la franclingva originalo *Vingt mille lieues sous les mers* aperis en 1871) menciis misteran lingvon, kiun kapitano Nemo uzadis kun siaj sam-sortaj kunuloj. Laŭ informo de l' aŭtoro: lingvo belsona, harmo-nia, fleksebla."

Per tio ĉi, la supre nomitaj aŭtoroj celas atentigi, ke la problemo de artefarita lin-gvo tre allogis la faman verkiston. Tamen, ili tuj saltas al la lastaj jaroj de Verne, kiam li jam estis aktiva esperantisto.

Sed mi deziras informi la legantaron, ke jam en 1889, kiam aperis ĉe la *Hetzeldonejo* lia romano *Sans dessus-dessous*, t.e. Senkape senkalkane (ĉeĥe *Zmatek nad zmatek*), troviĝas en la 20-a ĉapitro jena frazo (tradukita fare de mi): "Inundis ilin (mi kompletigas laŭ la kunteksto: la kanonklubanojn) tiom da moknomoj, ke eblas ilin reprodukti nek latine, nek esperantlingve (substreki mi)."

Do, bonvolu konsideri, ke Verne komencis verki la romanon antaŭ 1889, t.s. baldaŭ post la zamenhofa lernolibro por rusoj (14. 7. 1887)! Tiun ĉi fakton mi tro-vis eksplicite prezentita en neniuj litera-tura fonto, eĉ ne en la plej freŝdata plume de Haszpra (1999).

### Fontoj:

*Delcourt, M. - Amoureux, J.* (1987): *Jules Verne kaj la Internacia Lingvo*. - La Brita Esperantisto, vol. 83, n-ro 878, p. 300-301. London. Represita el *Revue Française d'Esperanto*, nov.-dec., 1977.

*Haszpra O.* (1999): *Jules Verne pri la lingvo Esperanto - hungare*. - *Scienca Revuo*, 3, 35-38. Niederglat.

*J. Kavka*

## Simfonio kun Esperanta teksto

Vendrede, la 6-an de oktobro je la 19-a horo, okazis en Olomouc en salono REDUTA koncerto de "Moravia filharmonio" kunlabore kun MASTER MUSICIANS COLLECTIVE. Unuan fojon en Ĉeĥio estis prezentita simfonio n-ro 1 kun teksto en Esperanto, kiun verkis komponisto kaj entuziasma esperantisto d-ro David GAINES (nask. 1961 en Usono). Je afiŝoj estis tiu simfonio nomita ESPERANTISTA.

Tio estis instigo por esperantistoj kaj koncerton vizitis pli ol 40 gesamideanoj ne nur el Olomouc, sed el la tuta Moravio. Post koncerto okazis interkonatiĝo kun s-ano D. Gaines, subskribado de programoj, komuna fotografado kaj vigla diskutado pri lia verkado. Neesperantistaj partoprenantoj de la koncerto miris, kiel glate kaj facile ni diskutas kun li. Multaj el ili demandis, per kiu lingvo ni parolas. Bonege, ke Dr. D. Gaines informis nin per interreto kaj perpoŝte pri ebleco aŭskulti lian modernan verkon, kie usona kantistino KIMBALL WHEELER kantis en Esperanto. Vortoj de Dr. Zamenhof, D-ino M. Boulton el Britio, s-ino Penka Papazova el Bulgario kaj de la komponisto mem, elkreis dum la koncerto misteran atmosferon. Kompakt-disko, kiu inkluzivos la ĉefajn verkojn de Dr. D. Gaines, haveblas tutmonde en j. 2001, eldonote de la firmao "MMC RECORDINGS Verda Stelo Music, kiu eldonas liajn verkojn.

Drkoč

## Intervjuo kun David Gaines

### 1. Ĉu vi povas diri ion pri vi kaj pri viaj komencoj en muziko?

Mi estas el Usono, kaj naskiĝis tie en la ŝtato Connecticut proksime de Novjorka Urbø en 1961. Mi fariĝis muzikisto nur kiam mi havis 13 jarojn, en la lernejo, sub influo de unu el la muzikinstruistoj.

### 2. Kiel vi konatiĝis kun Esperanto? Ĉu tio okazis en iu rilato al muziko?

Ne temis pri muziko. Kiam mi estis dekjarulo, mi jam studis la hebrean lingvon kaj komencis studi la hispanan. Ĉiuj lingvoj interesis min, kaj mi ĝuis tian studadon. Iamaniere mi trovis Esperanton. Mi opinias, ke gravas meti E-librojn en lokaj bibliotekoj, por ke aliaj kiel mi povu trovi la internacian lingvon por si mem.

### 3. Kiamaniere vi kontaktiĝis kun Moravia Filharmonio en Olomouc?

La firmao, kiu eldonas mian kompaktdiskon, MMC Recordings el Bostono, havas rilatojn kun tiu orkestro kaj aliaj en orienta Eŭropo. Do MMC estis la peranto.

### 4. Kial vi elektis por la unua prezentado de via Simfonio n-ro 1 ĝuste Olomouc?

Nu, mi havis elekton, kiam mi planis la aferon kun MMC. Aliaj eblecoj estis la Londona Simfonio en Britio, kaj orkestroj en Varsovio kaj Prago. Tamen, mi havis malmultajn rimedojn por kovri la kostojn.

**5. Tekstoj en Esperanto ne estas kutimaj por tiaj komponaĵoj. Kio gvidis vin al uzo de ĉi tiu "stranga" (certe por iuj) lingvo?**

Tute ne estis stranga afero por mi. Tiu simfonio estis mia doktoriĝa disertacio, kaj kiam mi eniris la Peabody Conservatory of Music en Baltimoro en 1992, mi sciis, ke mi volus verki ion rilate al Esperanto.

**6. Ĉu vi povas diri ion pri komponado de la Simfonio kaj pri ĝiaj ĉefaj ideoj?**

Nu, preciza respondo al tiu demando verŝajne daŭrus kelkajn horojn! Mallonge dirite, unue mi decidis pri la listo de instrumentoj, pri nekutime granda orkestro kun saksofonoj kaj tenora tubjo, kaj multegaj perkutinstrumentoj.

La dua paŝo estis arigi taŭgajn tekstojn por la voĉo. En 1994 mi vojaĝis al Britio kaj Bulgario kaj sukcesplene trovis poemojn (unu de D-ino Marjorie Boulton, la fama E-verkistino, kaj unu de relative nekonata bulgarino, Penka Papazova).

**7. Ĉu estis malfacile gajni tiel faman kantistinon kiel Kimball Wheeler por kanti tekstojn en Esperanto?**

Ne, ĉar inter ŝi kaj la firmao MMC Recordings jam ekzistis kunlaboro. La estro de MMC, William Thomas McKinley, estas mem tre fama usona komponisto kaj engaĝis ŝin antaŭe por kelkaj projektoj. Li rekomendis ŝin pro la forta mezosoprana voĉo.

**8. Kion vi povus diri pri registrado de la Simfonio antaŭ la koncerto?**

Nu, la verko estas tre, tre malfacila, kaj en perfekta mondo oni starigus semajnojn da

provekzercoj, sed ni havis nur unu tagon! Tamen la Moravia Filharmonia Orkestro estas ege profesia kolektivo de muzikistoj, kiuj laboris verve por krei kiel eble plej bonan registron.

**9. La koncerto estis por la aŭskultantoj senpaga - kiu financis ĝin?**

Estas tradicio havi senpagan koncerton en Olomouc ĉe la fino de registradaj sesioj por MMC.

**10. Ĉu vi sentas ian diferencon en la reciprokaj rilatoj, kiam vi estas post koncerto ĉirkaŭita de angle parolantaj favorantoj aŭ esperantistoj?**

Jes, sendube la esperantistoj estis multe pli entuziasmaj kaj gratulemaj! Mi ĉiam estos kortuŝita kaj dankema. Sen ili mi sentus min iom sola (ekster Esperantujo mi estas nekonata en Ĉeĥio). Sed estas ĉiam tiel por nuntempaj komponistoj.

**11. Ĉu vi volas aldoni ion (eble interesajn) pri la koncerto, pri Olomouc aŭ pri Ĉeĥio?**

Jam la fakto, ke la koncerto okazis, estas bonega kaj laŭdinda. En Usono, en relative malgranda urbo, tio tute ne eblus. Ankaŭ la eblo uzi unu el viaj bonaj orkestroj, kaj vidi la muzikistojn ĉe laboro. Mi volas danki s-ron Vít Mická, la dirigenton, pro lia laboro kaj amikeco; S-ron Elliot McKinley de MMC pro lia sperta gvido de la tuta projekto, la spertulojn Radek kaj Aleš, la registristojn, kiuj kreos la finan kompaktdiskon, kaj ĉiujn ĉe la Moravia Filharmonio.

*Josef Vojáček* ▽

## XIII-an Esperanto-tagon en Pardubice

partoprenis (sabate la 16-an de septembro 2000) 58 geesperantistoj el multaj lokoj de Ĉeĥa respubliko. La plej malproksimaj vojaĝis por unutaga renkontiĝo eĉ el regionoj de 260 km.



En la programo estis vizito de universitata aŭlo kaj biblioteko en nova konstruaĵo, kie ni al kelkaj E-libroj donacis pluajn. La gvidantino de la biblioteko informis pri historio de Universitato, kiu ĵus festas 50 jarojn de altlernado en Pardubice. Vizito de studsalono de interreto estis tre interesa por tiuj, kiuj ĝis nun ne havis eblecon kun interreto konatiĝi. En ĝi estis trovita paĝo el UEA kongreso en Tel-Avivo kun fotoj de diversnaciaj partoprenintoj, inter ili du niaj membrinoj. La programo daŭrigis en Kultura domo per prezento de folkloraj dancoj de usonaj vakeroj. Pri enmetado de multaj libroj de ĉeĥa literaturo en paĝojn de interreto parolis redaktoro de Starto s-ano M. Malovec. Ĝi estas formika, sed tre merita laboro. Poste la partoprenantoj aŭdis personajn travivaĵojn el UK Tel-Avivo, el kongreso de EU en belega Oostende, el Baltaj someraj tagoj en Tallin kaj pri vojaĝo en Francio. Venonta XIV-E-tago okazos nur en la jaro 2003.

JARY

## Malgraŭ la superstiĉo ...

La 13-a Kultura Festivalo (29.9.-1.10.2000) en Ústí nad Labem tre sukcesis. Kiel tradicie ĝi estis farita omaĝe al Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr (pro iliaj samtempaj naskiĝdatoj). La jubilantojn oni rememoras precipe per ilia traduk-agado. Kaj same estis ĉijare.

Specimenoj de la tradukitaj poeziaĵoj (versoj, kantoj, melodramoj) akompanis prelegon pri Jiří Karen, poeto forpasinta ĉijare, la noblan kortuŝigan koncerton en la Ruĝa preĝejo (honore al ĉeĥa patrono - sankta Venceslao), kaj ankaŭ la muzik-koncerton vesperan. "Dolĉan pezon" pro preparo - kaj same pro la sukceso - tenis sur siaj ŝultroj la "Smyčka-teamo".

Per doloraj sentoj nin ĉagrenigis s-ano Petro Chrdle: en 2 videofilmoj li prezentis la vivon kaj la forpason de sia edzino Stanjo Chrdlová, ĉefdelegitinode ĈEA ĉe UEA. Malgraŭ la tragedio, kiu trafis la familion, ni, la "verda familio", estu fieraj, ke nia lando donis al la tutmonda E-movado ĉi grandulinon (kvankam laŭkreske ŝi estis tiel ĉarme nealta). Ni verŝu larmojn de la feliĉo, ke ni ŝin konis kaj ke ni povis ĝui ŝian multifacetan E-agadon. Honoron al vi, kara Stanjo.

M. Turková



## Prémia OSIEK - Strážnice 2001

OSIEK každoročne počas Medzinárodnej esperantskej konferencie rozhoduje o finančnej prémii autorom rôznych diel napísaných v esperante alebo preložených z iných jazykov. Návrhy na udeľenie prémie podávajú všetci členovia OSIEK-u podľa vlastného uváženia v období medzi konferenciami. Tieto diela sú potom počas konferencie predstavené v pléne a udeľenie prémie sa potom demokraticky hlasuje, niekedy aj vo viacerých skrutíniach. V prípade rovnosti hlasov v poslednom skrutíniu sa rozhoduje podľa Tvarožkovej novely alebo dodatku, ktorý bol prijatý na Medzinárodnej konferencii v Poprade roku 1996, kedy prvý krát nastala rovnosť hlasov pri hlasovaní v poslednom skrutíniu.

Od roku 1988, kedy OSIEK organizoval prvú Medzinárodnú konferenciu v Metz, boli každoročne udeľované zmienené prémie a boli udeľené autorom ako Evaldo Pauli (Brazília), Ulrich Lins (Nemecko), Donald Broadribb (Austrália), XIE Yuming (Čína), Trevor Steele (Austrália) atď.

Na rok 2001, kedy sa bude o finančnej prémii rozhodovať na Medzinárodnej konferencii v Strážnici, sú medzi návrhmi na OSIEK-prémii navrhnutí nasledujúci autori - William Auld, Tazio Carlevaro, Eli Urbanová (za román *Hetajro dancas*), Ulrich Hatto von Hatzfeld, Herald Schnicke, Spomenka Stimec a iní.

*Ján Göldrich*

## Ascendo al Rysy

Vendrede 25.8.2000 venis 12 esperantistoj el Pollando, Ĉeĥio kaj Slovakio (inter ili ankaŭ kelkaj infanoj) al Altaj Tatroj por ascendi al Rysy sub gvido de Vlado Surovček. Post tranoktado en tranoktejo Tesla en Liptovský Hrádok la turistoj forveturis al Štrbské pleso kaj marŝis al Rysy. La vetero estis pluvema kaj malagrabla, tial la grupo atingis nur la kabanon sub Rysy, trinkis teon kaj revenis. Apud Popradské pleso ili vizitis simblan tombon por viktimoj pereintaj en Tatroj kaj dimanĉe E-arbon en Pribilina.

A. Krejčíř, EK Přerov

## KORESPONDI DEZIRAS

\* Membroj de nia Tangshan-a E-Asocio volas korespondi kun esperantistoj el via lando. Skribu al adreso: TEA, P.O. BOX 3, Tangshan HeBei, 063000 Ĉinio.

\* Pri vojaĝo, religioj, fremdaj lingvoj, vegetariismo kaj socia vivo en diversaj landoj deziras korespondi 67-jara T. James Brennan, 23 Kathrose Drive, Willowdate, Ontario, Canada M2J 3P4

\* \* \*

**DUKOVANY sponzorovaly Esperantský tábor v Lančově obdržel od Elektráren Dukovany sponzorský dar 20 tisíc korun.**

## KAEST 2000: renkontiĝo de fakaj aplikantoj de Esperanto

Dum la tagoj 10-a ĝis 12-a de novembro okazis en Prago Kolokvo Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, kiun aranĝis Ĉeĥa Esperanto-Asocio kiel sian kontribuon al Kampanjo 2000 sub aŭspicioj de UEA. Ĝin partoprenis entute 41 personoj el 11 landoj (BE, BG, BI, CZ, DE, DK, FR, HU, NL, SE, SK).

Traktado okazis en tri sinsekvaj sekcioj, nome Ekonomio sojle al la tria jarmilo (7 kontribuoj), Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto (10 kontribuoj) kaj Scienco kaj tekniko ĝenerale (4 kontribuoj).

Dimanĉe ĉe "ronda tablo" la partoprenantoj diskutis estonton de KAEST: estis fiksita la venonta dato denove post du jaroj en tradicia tempo, 2002-11-8/10, kaj kiel temo de la unua sekcio estis difinita "Elektronikaj rimedoj", dum la temoj de la dua kaj tria sekcioj restos tradiciaj. La lokaj organizantoj surloke akceptis rekomendon, ke la tradicia aranĝo ŝanĝu sian nomon al "konferenco" anstataŭ "kolokvo", do KAEST 2002 okazos kiel "Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko".

La kolokvon antaŭis terminologia seminario pri fervoja transporto kaj trafiko en Dobřichovice apud Prago sub aŭspicio de IFEF. Ĉeestis ĝin nur 8 partoprenantoj, de 3 landoj (CZ, DE, DK), tamen ĝiaj partoprenantoj esprimis kontenton pri eblo povi profunde sen tempa premo pridiskuti terminarajn problemojn de sia fako kaj deziron ripeti ĝin antaŭ venonta KAEST.

*Petro Chrdle*

## Paroliga kurso

Komence de decembro (1/3.12.2000) venis al Dobřichovice apud Prago trideko da personoj sopirantaj perfektigi sian parolkapablon en Esperanto. En sporta pensiono Sokol ili trovis ne nur tranoktadon kaj manĝon, sed ankaŭ du instruĉambrojn por kursanoj pli kaj malpli progresintaj.

La gvidantoj alternis en instruado, la liberaj gvidantoj dume kunsidis en kancelario de KAVA-PECH kaj seminario pri instruistaj problemoj, spektis novan usonan videokurson "Pasporto al la tuta mondo" aŭ okupiĝis pri "falsaj amikoj en Esperanto" (*absolvi, termino, koncipi k.s.*) kaj pri ilia klarigo al la kursanoj. Al la seminario aliĝis kelkaj iamaj farintoj de la asocia ekzameno "pri kapablo instrui Esperanton" kaj usona gasto Brian.

En la kursoj estis trejnataj ĝeneralaj temoj kiel familio, urbo, domo, loĝejo, vestado, aperis anekdotoj kaj aliaj metodoj instigantaj la kursanojn paroli.

La vespera amuzo kun "vozemboŭho" estis spicita per konkurso, kiel sprite traduki "me-che-che" (venkis "ĝu-ĥo-ĥo"), per donacetoj postporde lasitaj de la Sankta Nikolao, kaj per vinbotela gratulo al la surprizita redaktoro de Starto, ke li jam denove estas je unu jaro pli aĝa.

Bonegan manĝon prizorgis kuiristino de Sokol. Dum la tuta programo funkciis ankaŭ libroservo kaj provizora bufedo.

La sekva "paroliga kurso" estas planata por printempo 2001, preciza dato ankoraŭ ne estis starigita.

*Miroslav Malovec*

## Strategia Laborplano de UEA 2001-2010

*En la novembra numero de la revuo Esperanto de UEA aperis teksto de la proponata laborplano de UEA por la jaroj 2000-2010. Oni lanĉas per tio vastan publikan diskutadon pri tiu teksto, alivorte oni petas, ke vi diru, kion UEA faru kaj kion vi mem faros. Post kritika ekzameno vi povas sendi viajn komentojn al adreso <labor-plano@esperanto.se>. (Se vi ne havas aliron al la reto, do pere de la redaktoro de Starto). Ni prezentas la ĉefajn ideojn.*

### AL LINGVA DEMOKRATIO

estas plano por nova kampanjo, sekvanto de "Kampanjo 2000 por nova lingva ordo" (= 1. *Levi la organizan kaj idean nivelon de la Esperanto-movado*, 2. *Levi la prestiĝon de la internacia lingvo*, 3. *Influi la internacian vivon*), kiu plivalidas ĝis la definitiva akcepto de la nova plano dum la komitatkunsido en Zagrebo 2001.

Ankaŭ la nova kampanjo havas tri agad-kampojn:

1. **komprenigo de Esperanto** (ekstera informado, interna klerigado pri Esperanto kaj pri internacia komunikado);
2. **paroligo de Esperanto** (de kursoj ĉiunivelaj, ĝis renkontiĝoj kaj kongresoj),
3. **utiligo de Esperanto** (por interkultura edukado kaj internacia praktika kunlaboro).

La strategiaj prioritatoj estas: **profesiigo, plijuniĝo, tutmondiĝo.**

## AL LA TRIA JARMILO

estas konkretiga plano:

### KOMPRENIGO DE ESPERANTO

Sur la interna kampo, necesas plifortigi la tradicion de daŭra klerigado pri Esperanto, ĉu temas pri la lingvo mem, ĝia historio, literaturo, socipolitika signifo aŭ terminologia evoluo. Inter la eblaj rimedoj troviĝas librokluboj, studgrupoj, seminarioj, ekzamenoj kaj konkursoj.

Sur la ekstera kampo, necesas celi ne nur al pasiva informado (nur al petantoj), sed plie al aktiva informado, ĉu al la publiko ĝenerala ĉu al pli faka publiko. Ĉiu organizaĵo pristudu la informkanalojn uzatajn por similaj kulturaj-sociaj-internaciaj agadoj en la concernaj landoj aŭ medioj. Oni nepre ne neglektu la diversajn uzojn de elektronikaj retoj por nacilingva informado. Oni ankaŭ utiligu maksimume la eblojn de tradukado por disponigi kvalitajn informojn en kiel eble plej multaj lingvoj.

### PAROLIGO DE ESPERANTO

Tio signifas atingi, ke lerniloj kaj lernokazoj - inkluzive de Esperantorenkontiĝoj - estu facile troveblaj kaj allogaj por la celataj homoj.

Necesas koncepti la esperantistigon kiel daŭran procezon, kiu ne finiĝas per la trapaso de baza kurso. Instruistoj trejniĝu pri komunikiga kaj aktiva pedagogio, ĉu ekster- ĉu en-movade; tiucele la movado evoluigu kapablojn liveri tian trejnadon je profesia nivelo, traktante precipe la specifajojn de Esperanto-instruado.



Ĉiuj kursgvidantoj dediĉu parton de la kurso al la pretigado de la lernantoj por posta memstara agado; laŭeble oni ankaŭ proponu konkretan daŭrigan kurson. En la planado de renkontiĝoj kaj kongresoj, la orientigo kaj kontentigo de novuloj estu nepre prioritato. Izolitojn oni kunligu telefone kaj retpoŝte.

### UTILIGO DE ESPERANTO

Tio signifas atingi, ke la celataj homoj trovu ion valoran kaj interesan per sia uzado de la lingvo. Necesas transiri de la nuna situacio al vast-skala utiligo de Esperanto por praktikaj celoj de la homa vivo, kiuj povas esti la plej variaj, de scienca informiĝo al komerco. Fakaj asocioj iĝu pli videblaj en landaj kaj internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj kaj en Interreto. Estu emfazo je interkulturaj utiligoj kaj je utiligoj proponebaj kiel eble plej frue al memlernantoj.

### PROFESIIGO

Tio signifas la varbadon kaj aktivigon de i.a. intelektuloj, universitatoj, sciencistoj, organizistoj, ĵurnalistoj, publicistoj, instruistoj, kaj aliaj. Celindas krome homoj kun fakaj kapabloj en kampoj ekster la propra profesio. Tiuj homoj kutime havas malmulte da tempo, gravas do la asocia apogo.

### PLIJUNIĜO

Tio signifas la varbadon kaj aktivigon de gejunuloj. TEJO kaj ĝiaj landaj kaj fakaj sekcioj ludas gravegan rolon en la nuntempa Esperanto-kulturo, sed tro ofte ekzistas divido inter ili kaj l

## LA TRIJARA PLANO ĝis 2004

### KOMPRENIGO DE ESPERANTO

- UEA zorgu pri disvastigo de informiloj pri Esperanto kun ĝisdatigitaj informoj kaj donu apartan atenton al la materialoj por informi lingvistojn kaj ĵurnalistojn
- UEA starigu aŭ/kaj aktivigu informan fakon por la ekstera publiko.
- Landaj asocioj starigu kontaktojn kun landaj instancoj, kiuj tenas ligojn kun internaciaj organizaĵoj.

### PAROLIGO DE ESPERANTO

- Komputil-retaj kursoj kaj servoj ricevu emfazon; estu premioj kaj financado por aparte bonaj hejmpaĝoj kaj enretaj projektoj
- Centroj por instruado de Esperanto kunlaboru kaj ofertu siajn servojn al neesperantistoj
- UEA kaj ILEI starigu novan ekzamenbranĉon "Instru-kapablo"
- UEA daŭrigu la Kampanjon "Savu Esperantaĵojn" kun la celo prizorgi kaj savi historie valorajn esperantaĵojn en bibliotekoj kaj muzeoj.

### UTILIGO DE ESPERANTO

- UEA aranĝu agadojn en la regionoj en kiu ekzistas etna/nacia streĉo por pruvi la pac-potencialon de Esperanto.
- La rolo instrua/kuntena/aktiviga de la revuo de UEA estu atentata.
- Ni trovu solvojn por maksimumigi la eblecojn de esperantistoj en la entreprena kampo: por Esperanto per Esperanto.

*Pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko mi komencis interesiĝi en la jaro 1966, kiam en la UK en Budapeŝto ekagis "Teknika Ligo". nun jam forgesita. Post longaj jaroj mi konstatas, ke nur sporadaj semoj ĵetitaj en la grundon en pasinteco rezistis kontraŭ nefavoraj kondiĉoj kaj hodiaŭ donas fruktojn. Tamen mi konstatas, ke mian agadon preskaŭ ĉiam sekvis plimalpli pozitivaj rezultoj, ke eblas sukcese lukti. Nun mia aĝo kaj sociaj cirkonstancoj ne permesas, ke mi faru multon. Tamen ideon mi havas. Kian? Mi nomas ĝin Iniciato FATo.*

### **Iniciato por Faka Apliko kaj Terminologio (FATo)**

1. Programa klerigo de junaj adeptoj al science bazita terminologio. Gvidi ilin estas preparita Jan Werner. Celo: Eduki grupon de junaj esperantistoj kompetentaj por funkciado en TEC.

2. Esploro de faka leksiko en esperantaj vortaroj, precipe difinaj (PIV), cele al malkaŝo de semantikaj kaj morfologiaj eraroj. Listigo de suspektaj kazoj kun komentario por estonta terminologia prilaboro. En KAEST 2000 J. Werner la problemon demonstris je la vortoj latiso kaj truso. En Esperanto estas multe da vortoj, kiuj estas fakaj nomoj kaj aspiras fariĝi terminoj, sed ties svagaj kaj eraraj difinoj baras tian evoluon.

3. Registrado de nocioj vakantaj en Esperanto. La registro estos dividita al bazaj UDK klasoj resp. subklasoj alfabete laŭ anglaj ekvivalentoj. Ĉiun nocion sekvas difino, priskribo aŭ citaĵo. La kolekto servos por estontaj terminologiaj laboroj.

4. Fondo kaj estrado de inventar-listo

de la tuta faka literaturo en Esperanto (memstaraj verkoj, tekstoj en kolektoj, artikoloj en gazetoj). Formo de la bibliografiaj notajoj sekvas la ISO-normojn kaj bazan dividon laŭ UDK, interne de unuopaj klasoj/subklasoj estos verkoj aranĝitaj alfabete laŭ aŭtoroj.

5. Aktiva subteno de aŭtoroj. Produktoj originalaj kaj tradukaj estos disponigataj al aktualaj fakaj gazetoj, ev. ofertataj al esperantista forumo ĉu interrete ĉu kiel kopioj de originalo deponita ĉe administranto.

6. Aperigado de informilo almenaŭ unufoje jare (papere kaj Interrete) kun resumo de ĉiuj rezultoj akiritaj en la Iniciato FATo.

La ideo *Iniciato FATo* estas programita vaste, tamen, malgraŭ interdependeco de unuopaj punktoj, ĉiu el ili povas starti memstare, esti administrata de unu homo aŭ de kolektivo. Pri realeco de la iniciato kiel tuto mi estas skeptika, tamen mi alvokas kunagantojn. Ĉeĥo Miroslav Malovec estas preta kunlabori en la bibliografio (4-a punkto), kiu estas parenca al la registra iniciato realigata en Budapeŝto, prezentita en KAEST 2000. Koscianta la modestan realon, mi estos kontenta eĉ pri minimuma resonado je tiu ĉi teksto, ekzemple, se aliĝos ĉe mia adreso kelkaj junaj esperantistoj por terminologia kunlaboro: Jan Werner, Kroftova 84, CZ 61600 Brno, Ĉeĥio.

Se iu el la esperantista komunumo scios mian programan skizon riĉigi, detaligi kaj samtempe proponos sin por helpi, mi estos ĝojigita.

*Brno, 2000-12-01*

## DISPONIGO DE LA CENTJARA ESPERANTA KULTURO AL LA HOMARO

La Strategian planon de UEA por la jaroj 2000-2010 ni povos realigi tiam, kiam ni klopodos celkonscie disponigi al la homaro ĉion, kio en Esperantujo estis kreita dum ĝia 113-jara historio kaj kion ni ankoraŭ kreas kaj kreos. Disponigita kulturo altiros intereson de gejunuloj kaj fakuloj, levos la prestiĝon de la movado kaj idean nivelon de esperantistoj mem.

Kaj male: se ni propagandos lingvon, kies kulturaj valoroj restos kaŝitaj en asociaj kaj klubaj bibliotekoj kaj privataj libroŝrankoj, pri tia lingvo la publiko ne interesiĝos, kaj intensigo de propagando kaj informado restos sen efiko.

Sed kiel krei kultur-centron de Esperanto, kiu estus atingebla de ĉiu homo en ĉiuj landoj, urboj kaj vilaĝoj? Tiam kapablon havas nun sole la interreto, kiu rapide disvastiĝas tra la tuta mondo. En la jaro 2010 eble duono de la homaro estos rete interkonektita. La virtuala Esperantujo en la reto disponas do pri tia atingo-povo, ke neniu alia nia kultur-centro povas kun ĝi konkuri.

Tial estas tre domaĝe, ke ĝi kreskas spontane kaj sovaĝe laŭ privataj iniciatoj de unuopuloj. La movado bezonas, ke paralele kun la privataj aktivecoj kresku en la reto ankaŭ oficiala Esperantujo laŭplane konstruata de UEA. Ĝi enhavu:

a) **Modelan informilon pri Esperanto** kun nacilingvaj variantoj. Ĝi servus ne

nur al hazardaj vizitantoj de TTT-paĝo en la reto, sed ankaŭ kiel modelo por paperaj flugfolioj kaj aliaj informiloj, kiujn nun kreas unuopuloj, ofte naive, eĉ frenezete, kaj iam pli damaĝas la movadon ol helpas.

b) **Modelan kurson de Esperanto** kun nacilingvaj variantoj.

c) **Modelajn vortarojn** (ĝeneralajn kaj fakajn), kiuj helpus al vortaristoj krei naciajn variantojn, ĉu por papera eldono, ĉu nur por elektronika uzo.

d) **Bibliotekon de Esperanto-literaturo**, beletra, faka kaj gazeta. Multaj homoj jam okupiĝas pri enkomputiligado (skanado) de jam eldonitaj verkoj, dum la novaj estas kutime kompostataj per komputilo kaj tial nature ekzistas en elektronika formo (sufiĉas nur konservi ilin). Ankaŭ malnovajn gazetojn oni revivigas komputile. Necesas respekti la aŭtorajn rajtojn de la verkistoj kaj tradukistoj, tamen principe granda parto de nia literaturo povos en la jaro 2010 esti alirebla por la tuta homaro, se ni laboro celkonscie.

e) **Modernan enciklopedion** pri ĉio ajn. La homaro bezonas la internacian lingvon ĉefe kiel fonton de informoj, kaj se Esperanto restos sola el la modernaj lingvoj, kiu tian enciklopedion ĝis nun ne havas, ĝi estos kiel internacia lingvo ne fidinda, ja eĉ neuzebla kiel fonto sen akvo. Estus bone komenci per Enciklopedio de Esperanto, kompletigi ĝin kaj poste daŭrigi per kulturoj de ĉiuj nacioj. La tuta esperantistaro povas ja kontribui, por ke nia enciklopedio estu pli bona ol la naciaj.

-mm-



## KONGRESO DE IFEF LA DUAN FOJON EN ĈEĤIO

La 53-a kongreso de IFEF okazos de la 12-a ĝis la 19-a de majo 2001 en Tábor, sub aŭspicioj de la ĝenerala direktoro de Ĉeĥaj Fervojoj. Ni nur notu, ke la 43-a kongreso de IFEF trovis kiel sian kongresurbon la moravian urbon Olomouc kaj la tuta aranĝo estis tre bone taksata de la partoprenintoj.

La garantiado de la 53-a kongreso estas la kongresa agentejo KAVA-PECH, kiu strebas, ke la partoprenontoj estu minimume tiel kontentaj kiel siatempe en Olomouc kaj ke la kongreso obeu ĉiujn tradiciajn postulojn de la IFEF-kongresoj. Tial krom la faka parto de la kongreso B kunsidoj de la IFEF-estraro, Faka Komisiono kaj la vico da fakaj prelegoj estas en la programa listo pluraj kulturaj, turismaj kaj amuzaj programeroj.

Ke la partoprenontoj povu almenaŭ suprajne konatiĝi kun la urbo Tábor kaj ties bela ĉirkaŭaĵo okazos tri duontagaj ekskursoj dum la kongresa semajno, nome promeno tra la urbo Tábor mem, ekskurso al la urbo Bechyně kaj la unua elektrizita fervojo en Ĉeĥio, oni vizitos la urbon České Budějovice kaj la kastelojn Hluboká nad Vltavou kaj Ohrada. Merkrede, 16.05.2001, estas planitaj kvar tagtagaj ekskursoj: ĉar temas pri la fervojista kongreso certe ne mankas la

ekskurso laŭ la spuroj de la ĉevalfervojo (Bujanov B Kreschbaum B Rybník), la dua interesa ekskurso montros al la vizitontoj la urbojn Český Krumlov, Prachatic kaj vilaĝon Holašovice (bienvilaĝa baroko), la tria ekskurso celas la urbojn Jindřichův Hradec, Třeboň kaj Telč. Por tiuj, kiuj ŝatas piedan turismon estos allonga la kvara tagtaga ekskurso tra la pitoreska ĉirkaŭaĵo de Tábor.

Nepre tradicia kaj neevitebla parto de la IFEF-kongresoj estas la ekumenaj diservoj. Tial ankaŭ en Tábor la diservo okazos, nome en la preĝejo de la Ĉeĥoslovaka Husana Eklezio.

El la kulturaj aranĝoj ni menciuj la kulturajn vesperojn (kiu prezentos la nacian kulturon) kaj la folkloran vesperon.

Kaj ne mankas ankaŭ "pura" amuzo B nome balo kaj bankedo.

Ni ankoraŭ emfazu, ke povas partopreni ne nur fervojistoj! Se vi volas ĝui bonegan etoson de esperantista kunvenego, nepre aliĝu ĉe la garantiado!

Speciale rabatita partoprenkotizo por niaj partoprenontoj estas 900,- Kč kondiĉe, ke ĝi atingos la konton 555444-051/0100 (KB Praha-Smíchov) plej malfrue la 20-an de januaro 2001.

Aliĝilojn kaj pli precizajn informojn bonvolu peti ĉe KAVA-PECH, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice; tel.: 02/991 22 01, fax: 02/991 21 26, e-mail:

[IFEF-kongreso@kava-pech.cz](mailto:IFEF-kongreso@kava-pech.cz),  
<http://www.kava-pech.cz/IFEF-kongreso>.

Zdeněk Pluhař  
sekretario de LKK

## NI KONDOLENCAS

\* Klubo "La Ponto" en Písek adiaŭis 13.10.2000 multjaran membron prof. Alois Štembera, iaman kluban prezidanton kaj instruiston, kiu mortis 8.10. en aĝo de 85 j.

\* La 24-an de novembro forpasis prof. Dr. Pravoslav Sádlo en aĝo de 75 jaroj.

- La 13-an de septembro forpasis Anton Zacharias (Slovakio, 1939.01.14. - 2000.09.13), plurlande konata instruisto laŭ la rekta metodo.

- La 29-an de septembro post grava malsano forpasis Zsuzsanna Barcsay, internacie konata kaj ĉatata E-instruisto, organizisto. Ŝia entombiga ceremonio okazos la 12-an de oktobro en Budapeŝto.

- La 5-an de aŭgusto 2000 forpasis akademiano el Kanado, Rüdiger Eichholz (nask. 1922), la ĉefa aŭtoro de Bildvortaro de Esperanto (368 bildoj kun 25 000 objektoj kaj iliaj nomoj)

## PF 2001

Pozor synové a dcery  
nastává konec jedné éry

Kmeti varují zas a zas  
Co bude dál to je jen v nás

A poštám se vyhybejte raději  
Na každém kroku číhají zloději

Také jsem se nevěřičně smálal  
a stačí menší k autobusu nával

U poštovny v Malešicích  
šlohnul mi chmaták osm tisíc

Jen jedno přání pro staré i mladé:  
Ať vás v příštím roce nikdo neokrade

*Čestmír Vidman*

## Rememore

- La 9-an de novembro ni memorigas 110-an datrevenon de Rudolf Hromada (1890-1964), aŭtoro de ĝis nun tre populara poŝvortaro, eminentan redaktoron de E-gazetoj kaj unu el plej bonaj stilistoj en ĝia historio (Riporto skribita en pendumila maŝo, Sileziaj kantoj k.s.)

- La 6-an de decembro pasis 5 jaroj post la morto de nia karmemora Josef Vondroušek (1904-1995), kiu postlasis vicon da beletraj tradukoj

## JUBILANTI

Vzhledem k novému zákonu o ochraně osobnosti, schválenému českým parlamentem, nemůžeme automaticky zveřejňovat jubily, jako jsme to dělali dříve. Omlouváme se, přesto přejeme všem, kteří dosáhli kulatého výročí, hodně zdraví a spokojenosti do dalších let a úspěšné vzkročení do třetího tisíciletí.

## PF 2001

Atentu, ĉiu ula kaj ina karulo,  
eraofinon haltos neniu spritulo.

Aĝuloj avertas nun kaj denove,  
ke vi estonte fidu nur vin senprove.

Paŝojn ne gvidu peter poŝtoj, boskoj  
famigiintaj pro ŝtelist-embuskoj.

Kun rido senzorga mi riskis multon  
kaj evenis antaŭbusan homtumulton

en Maleŝice, apud loka poŝtejo ...  
Sen ok mil mi gapiis kiel bubo el bovpaŝtejo

Deziro mia al la juna, olda amikaro;  
neniu vin priŝtelu en venonta jaro.

*Čestmír Vidman*

Rezultoj de geknaba pentro-konkurso

## Afiŝo por Esperanto

**Kategorio de la pli aĝaj - sume 13 bildoj**

1. Svatava Foltýnová, Ratíškovice
2. Daniela Gajdíková a Magda Blahová, Ratíškovice
3. Lukáš Durin, Ratíškovice

**Kategorio de la malpli aĝoj - sume 50 bildoj**

1. Michaela Marchesi, Olomouc
2. Gabriela Šilarová, Brandýs nad Orlicí
3. Lucie Svobodová, Ratíškovice



## INFANOJ EL OKŘÍŠKY

En la elementa lernejo de Okříšky apud Třebíč la infanoj mem eldonas lernejan gazeton (kies titolo paĝon vi vidas supre). La gazeto portas la nomon *Poškoláček* ("postlernejuleto" = infano pune retenita en la lernejo post instruado) kaj unu paĝon ĉiam verkas Esperanto-rondeto gvidata en la lernejo de d-ino Kamila Bártlová. La artikolo estas verkita ĉeĥlingve, por ke la ceteraj gejnaboj vidu, kion la rondeto faras. Du knabinoj el Okříšky venkis antaŭ du jaroj en

internacia pentro-konkurso (Starto 4/1998, p. 14). Sube vi vidas parton de la rondeto.



Grupeto ascendinta al Rysy (vidu p. 14)



## Ekspozicieto

de Esperanto en monstro-fenestro de viandisto Fr. Touš en Paca placo (Mírové) pruvis al civitanoj de Ostrov, ke per la internacia lingvo eblas komuniki en ĉiuj kontinentoj..

Josef Novosad



## Antologio por junuloj

Aperis fine de februaro la plej dika numero en la 26-jara historio de *Juna amiko*. Ĝi elstaris ne nur pro la 52-paĝa amplekso, sed ankaŭ pro kolora foto sur la kovrilo de junuloj en la Infana Kongreseto en Montpeliero. Ekde nun, la revuo regule logos junulojn kaj lernantojn per plenkoloraj kovriloj.

Nur tri redaktoroj (tri naciecoj, unu loĝlando) gvidis la revuon tra ĝia kvaronjarcento; ili kunlaboris en la malfacila tasko elekti la kremon el la 87 aperintaj numeroj. Kvardek ok artikoloj travivis ilian kribrilon. kun aŭtoroj el 23 landoj kaj ĉiuj kontinentoj, inter ili Baghy, Boulton, Jevsejeva, Kalocsay, Palu, Potts, Ragnarsson kaj Rössler. Praktike ĉiu jaro de 1974 ĝis 1995 reprezentigis. Laŭgenre: poemoj 13, artikoloj 9, ŝerc(ar)oj 9, fabeloj 3, enigmoj 2, kantoj 2, teatraĵetoj 2, bild-strioj 2, tabul-ludo 1, rol-ludo 1, alia 4.

Rimarkinde, ke Geza Kurucz (Hungario) redaktis la revuon ekde la prov-numero fine de 1973 tra naŭ jaroj, kaj tamen akceptis repreni la taskon denove ekde 1997. Ankaŭ, ke ilustraĵoj de Pavel Rak (Ĉeĥio) aperis jam en la dua numero, kaj en la antologia kaj en preskaŭ ĉiuj inter ili aperintaj.

Perantoj en trideko da landoj akceptas abonojn (la antologia numero estas 99/1). La antologian numeron oni povas aĉeti aparte je 3,60 eŭroj aŭ 7,80 NLG ĉe ILEI (p/a p.f.193, HU-1368 Budapeŝt, Hungario) aŭ ĉe nia peranto V. Hasala (vidu p. 2)

## Malgranda fina venko - sen preparo (Laŭ Eventoj)

### Esperanto akreditita en Hungario

Pasintjare oni akceptis en Hungario novan leĝon, kiu transformis la strukturon de la ŝtate rekonitaj lingvo-ekzamenoj. Ĝis nun en la unua paŝo estis rekonitaj nur 7 fremdaj lingvoj, kaj nun, post plurmonata klopodo, la 25-an de septembro oni akreditis ankaŭ Esperanton!

Plej grava estas la "diplom-kondiĉo", ja ekde 3 jaroj studentoj en altlernejoj kaj universitatoj rajtas ricevi sian diplomon, nur se ili havas 1 aŭ 2 ŝtate rekonitajn lingvo-ekzamenojn. Tiu kondiĉo instigis multcentojn da studentoj eklerni Esperanton, kaj la nuna akreditado remalfermas la pluan pozitivan vojon al pli vastskala E-instruado.

Tamen malgraŭ la ekzisto de tradicia landa asocio kaj ankaŭ de landa ILEI-sekcio, ne estis preparita landa listo de instruistoj kapablaj kaj volantaj instrui la lingvon en kursaj sistemoj. Pro tiu "atako" dum kelkaj monatoj elĉerpiĝis la vortaroj en la librovendejoj. Venis do malgranda "fina venko", sed la tradicia movado ne estis preparita.

Nur latatempe estis produktitaj kaj dissenditaj reklamafiŝoj al preskaŭ ĉiuj mezlernejoj, estis eldonita nova, moderna flugfolio en multmil ekzempleroj, aperis plurdekoj de gazetanoncoj, interretaj ligoj al E-instruaj paĝoj, ni ĉeestis la lingvo-festivalon en Budapeŝto, estis invititaj al televida intervjuo, ktp.

*Laszlo Szilvasi*  
prez. de Kultura E-Asocio ĉe Eventoj

## THORSEN-APOGO AL 15 BIBLIOTEKOJ

UEA disdonis por la kvara fojo subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. Rekorda nombro de 28 Esperanto-bibliotekoj el 21 landoj sendis peton. La juĝkomisiono povis ĝojigi 15 bibliotekojn, inter kiuj estis dividita la sumo de 1800 eŭroj.

La subvencion ricevis: Kataluna Esperanto-Asocio; Vjetnama Esperanto-Asocio; Bonaera Esperanto-Asocio, Argentino; Ĉengdu-a Esperanto-Asocio, Ĉinio; Esperanto-Biblioteko Novaj Horizontoj, Kolombio; Esperanto-Societo La Progreso, Prilep, Makedonio; Korea Esperanto-Asocio; Esperanto-Societo Bude Borjan, Zagrebo, Kroatio; Malta Esperanto-Societo; Kultura Esperanto-Centro de Angevin kaj Esperanto-Kulturcentro de Tuluzo, Francio; Esperanto-Muzeo Lajos Gyula, Pecs, Hungario; Animada Klubo de Esperanto, Zambio; Bulgara Esperanto-Asocio; Lipecka Esperanto-Klubo Revo, Rusio.

Ekde la unua aljuĝo en 1997 ĝis nun, entute 43 Esperanto-bibliotekoj povis pligrandigi siajn kolektojn per subvencio de la Biblioteka Apogo. Pro la multeco de la petintoj la subvencio ankoraŭ ne estis asignita dufoje al sama biblioteko.

Petoj por la aljuĝo en 2001 devos atingi la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15-a de oktobro 2001. Ilin akompanu listo de dezirataj libroj ordigitaj laŭ prefero, ĉar la subvenciojn oni ricevas ne kiel monon sed kiel librojn. Konsiderataj estas nur bibliotekoj, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia ekstermovada instanco.

## Esperanto en ĉeĥaj krucenigoj

En la 19-a numero de la ĉeĥa gazeto *Křížovky* (Krucenigoj) aperis en fremdlingva anguleto Esperantská střídavá křížovka (Esperanta alterna krucenigo) kun 37 sufloritaj Esperantaj vortoj. La artikolo estas subskribita -kk-.

En la septembra numero de *Osmisměrky léčivé* (Okdirektaj krucenigoj kuracaj), dediĉita al kuracaj plantoj, aperis artikoleto *Esperantisté léčí chřipku* (Esperantistoj kuracas gripo) kun konsilioj laŭ Esperantista Vegetarano.

## Renkontiĝo en Písek

La planita renkontiĝo en Písek kun esperantistoj el ĉirkaŭaĵo ne okazos la 9.12.2000, sed sabate post unu semajno, t.e. la 16.12.2000. Temas pri tradicia Rememoro pri Zamenhof kun antaŭ-kristnaska programo. Písek, Soukenická ul. "Petrium", komenco je la 14-a horo.

R. Krivánková

## Ĉeĥa-saksa Tago en Ústí

estas ĉijare dediĉita al rememoro de Rudolf Hromada (110-a naskiĝdatreveno), Josef Vondroušek (5-a mortdatreveno) kaj Karel Píř (80-a naskiĝdatreveno). Ĝi okazis la 9-an de decembro 2000, ĝuste dum la redaktado de ĉi tiu paĝo.

## Korespondaj kursoj

Ĉijare aliĝis 17 komencantoj kaj 2 progresintoj (en 1997 - 2 kursanoj, 1998 - 10 kursanoj, 1999 - 16 kursanoj)



UK Zagrebo

## Informoj por interesatoj pri UK:

Mi rememorigas ĉiujn interesatojn pri la partopreno de la 86-a Universala kongreso de Esperanto en Zagrebo, ke la plej favora kongreskotizo validas nur ĝis la 31-a de decembro (por tiuj, kiuj pagas rekte al UEA), aŭ ĝis la 27-a de decembro, se vi pagos pere de mi en ĉeĥaj kronoj.

Se vi ne estas individua membro de UEA, certe valoras aliĝi minimume por la jaro de via partopreno de la UK, ĉar per la pago de la membrotkizo kategorio MJ (420.- Kč al la konto de ĈEA 3330021/0100 ĉe KB Poděbrady variebla simbolo 6941) vi ne nur ricevos la Jarlibron de UEA, sed samtempe vi pagos je 814 Kč malpli ol se vi ne estos IM de UEA. Pri pliaj informoj rilate UEA bv. turniĝi al la UEA-ĉefdelegito por Ĉeĥio Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. 1, 130 00 Praha 3, kiun bv. ne forgesi informi pri via pago de individua membreco de UEA.

La kongreskotizo por UK en ĉeĥaj kronoj estu pagata al la konto 555444-051/0100 ĉe KB Praha-Smíchov, variebla simbolo 210701. Atentu, ke la jenaj kotizoj validas nur se la pago atingos la konton ĝis la 27-a de decembro, ĉar mi bezonas tempon por informi UEA pri la pago ĝis la 31-a.

Individua membro de UEA

3330.- Kč

Ne individua membro de UEA

4144.- Kč

komitatano, familiano, junulo, handi-

kapulo, mem individua membro de UEA 1665.- Kč komitatano, familiano, junulo, handikapulo, ne individua membro de UEA 2479.- Kč

Informon pri la pago kune kun la plenigita aliĝilo (mi volonte sendos ĝin al ĉiu, kiu ne ricevis ĝin rekte de UEA) bv. sendi al la adreso: Petr Chrdle, Anglická 878,\* 25229 Dobručovice, fakso 02/9912126, rete: chrdle@kava-pech.cz. Informojn vi povas ricevi ankaŭ telefone: 02/9912201.

Pro la simpla atingeblo de Zagrebo per rekta aŭtobuso mi ne organizos ĉijare komunan karavanon. Interesatoj pri komuna vojaĝo bv. turni sin al Jarmila Rýznarová, pri kies karavano por handikapitoj bv. legi en alia loko de ĉi tiu kajero. Tamen, ankaŭ tiuj, kiuj veturos individue, povos uzi por pagoj de ĉiuj servoj de UEA el la oferto de la dua bulteno en Kč mian peradon.

Venontaj kongresoj:

ili okazos en Fortaleza (Brazilio) en 2002 kaj en Gotenburgo (Svedio) en 2003. Por partopreni ambaŭ mi planas jam tradiciajn internaciajn karavanojn ekflugantaj de Prago. Kiu do intencas partopreni ilin, bv. jam nun indiki al mi vian intereson, ke mi ne forgesu sendi al vi ĝustatempe la priajn informojn.

*Petro Chrdle,*

*UK-peranto por Ĉeĥio*



## INFORMACE O ZÁJEZDU NA UK ZAGREB

Svaz zdravotně postižených esperantistů ve spolupráci s Esperantským klubem doktora Schulhofa v Pardubicích připravuje

### autokarový zájezd na světový kongres UEA do Záhřebu v Chorvatsku ve dnech 20.7. - 30.7.2001

Jsme v jednání s esperantistkou v Záhřebu, která je ochotna nám zajistit skromné ubytování ve škole pro handicapované děti, kde WC a sprchy jsou na poschodí, s polopenzí ve škole. Cenu prozatím neznáme, ale jistě to bude levnější než ubytování přes UEA. Dále jednáme s majiteli autobusů Karosa, který je pro invalidní občany pohodlnější. Předpokládáme, že cena zájezdu nepřesáhne 10 000 Kč (bez kongresového poplatku).

Upozorňujeme, že kongresový poplatek je levnější do konce t.r. (viz předcházející strana). To znamená, že kongresový poplatek si zařizuje každý sám. Omylem jsme dříve psali, že s-ano Chrdle přijímá dopisy výhradně elektronickou poštou. Opravil nás, že jí dává přednost, ale je možno psát i normálně, faxovat, telefonovat.

Jakmile budeme znát přesnou cenu zájezdu, budete informováni v Informilu AEH i ve Startu. Po kongresu bychom ze Záhřebu zajeli na celý den k moři a domů bychom pak jeli přes noc.

Potřebuje vědět, zda naplníme autobus pro 45 osob. Zájemce žádáme, aby nám napsali nejpozději do konce roku.

**Svaz zdravotně postižených esperantistů**

c/o Jarmila Rýznarová  
Na Okrouhlíku 953/21  
530 03 Pardubice  
tel. 040/6611941

## BICIKLISTOJ, ATENTU!

La unua Internacia biciklista renkontiĝo (IBIRE) okazos de la 5-a ĝis la 9-a de septembro 2001 en Doksy, do en belega regiono apud Lago de Mácha, kie la plej konata ĉeĥa romantika poeto ofte estadis kaj ĉerpis tie inspiradon por sia fama romantika poemeto Majo.

La programo konsistos el komuna biciklado dumtage kaj vesperaj prelegetoj kaj amuzprogramoj. Oni planas veturi potage proksimume 50 kilometrojn kun paŭzoj por klarigado pri survojaj vidindaĵoj. Ĉiu partoprenanto ricevos planon kun la orientiĝpunktoj, do povos laŭvole mallongigi, eventuale plilongigi la proponitajn itinerojn.

Pli proksimajn informojn kaj aliĝilojn vi ricevos ĉe: Petro Chrdle, Kava-Pech, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel.: 02/991 2201, fakso: 02/9912126, rete: chrdle@kava-pech.cz.



## Lingvaj ludoj kaj enigmoj

La solvoj de la kvadratoj el la antaŭa numero:

5. tunel', ululi, nudul, eluzi, lilio

6. Kanapo, abonar', nomadi, analog', Padova, organ'

La plej ampleksa kaj populara enskriba enigmo estas t.n.


### KRUCENIGMO

La kampo por enskribi esprimojn povas havi diversan formon kaj gran-decon. En la liniojn horizontalajn kaj vertikalajn oni enskribas ordinare kelkajn vortojn, kiuj estas dividitaj inter si per pli dikaj interkampetaj strekoj aŭ vakaj kampetoj (diverse signitaj). La komen-tario kun difinoj por enskribotaj esprimoj estas aparte. Nun estas mode enskribi komenton en la vakajn kampetojn rekte en la krucenigman kampon.

La kampo kaj la limstrekoj aŭ vak-kampetoj devas formi simetrian bildon. La substantivoj enskribotaj devas esti en nominativo (singulara aŭ plurala) kaj la verboj en infinitivo. Vortoj en la sama krucenigmo ne ripetigu (se jes, do ili estu alimaniere difinitaj). En Esperantaj krucenigmoj oni povas elizii ĉe substantivoj la finaĵon -o. En la komentario oni signas ilin per elizia signo (˘) aŭ per "r" (= radiko) en krampoj. Ordinare havas krucenigmo kaŝaĵon. Al la komentario estas ofte aldonita "helpo", en kiu la aŭtoro malkaŝas la esprimojn, kiuj estas malfacile diveneblaj.

Estas rekomendinde, ke la solvanto ĉe ĉiu enskribita vorto tuj kontrolu ĝustecon

de ĝiaj unuopaj literoj divenante la esprimojn, kiuj krucas ĝin.



Komentario al la ekzemplo:

**Horizontale:** A) **La unua parto de la kaŝaĵo (Esperanta proverbo).** B) Alta perfekteco, animala aŭ homa organar', scienc' pri la sano. C) Substatuo, montara kapr', iamaniere, ŝuista pikilo. D) Pli ol sufiĉa, senbarbigi, teatraĵ', ne tia. E) Muzika son', **la dua parto de la kaŝaĵo**, malmulte. F) Projekcia tolo, malglata tekstilaj', senformeco. G) Disfalinta konstruaĵo, ne granda rompiĝ'. H) Vertikala grando, centr' de cirko, malamuzi, virinvoĉe. I) Ident', **la tria parto de la kaŝaĵo**, skandinavia monero.

**Vertikale:** 1) Perprema pulvorig', surtera balkon'. 2) Flara percepto, pikinsekta. 3) Konsci' pri io jam vidita, sonsistem'. 4) Ĉirkaŭkolaja, tekstilia material', kolektiviga sufikso. 5) Flanka parto, ĝermana gravurlitro, grupiga sufikso. 6) Nomo de la 7-a litero, kapkovrilo, farad' de verko. 7) Aparta cirkonstanco, blanka kalkaj'. 8) Vorte signi, tire post si. 9) Malvarm', denova maldormig'. 10) Muzika verko, produkt' de cerbo. 11) Unu el sangaj faktoroj, akvopuriga, komplet'. 12) Apartenanta al mi, lakta ina organo, nedistingita aĵo. 13) Rabobirda, izol', sufikso por membro. 14) Nigre dekoracii arĝentaĵon, vojstango por trajnoj. 15) Zorganto pri destino, kredante al iu. 16) Mita filino de Kadmo, metala pagil'.

Carlo Sarandrea, Romo

## **Orienta politiko de Vatikano**

*(Publikigita kun permeso de la aŭtoro)*

Neniu povas nei, ke la historio de la rilatoj inter Sankta Seĝo kaj la landoj de la komunista bloko, ekde 1917 ĝis la duono de la okdekaj jaroj kaj pli poste, kun la falo de la Berlina Murego, estas dramoplena el religia kaj politika vidpunktoj. Sub ĉies okuloj, sed ankaŭ en la karno de multaj estas la atesto pri tiuj suferoplenaj jaroj, markitaj de martirigoj, blinda persekutado. Sufiĉas pensi pri la amasa murdo de pastroj kaj fideluloj en Albanio.

Ĉi tiu mallonga interveno, verŝajne tro rapida, sed ligita kun la neceso obei al la ritmo de la programo, celas revui la multajn elpaŝojn, kiujn la Sankta Seĝo faris dum la jardekoj por la bonstato ne nur religia de tiuj loĝantaroj. Estis publikigitaj multaj “instituciaj” dokumentoj, kiuj aldoniĝis al la paroladoj kaj tekstoj de la Papoj kaj de la Eklezio: ne abundas, kaj tamen estas multaj la libroj pri ĉi tiu temo, preskaŭ ĉiuj publikigitaj dum la lastaj 20 jaroj, en pluraj lingvoj. (Parenteze, oni ne rimarkas multe da fantazio en la titoloj: “Vatikano kaj Ostpolitik”, “Paŭlo la 6-a kaj Ostpolitik”, “Vatikano kaj Moskvo”, “Romo kaj Moskvo”, ĝis “Sankta Petro kaj Kremlo” kaj “La Kruco kaj la Stelo”.)

Vi aŭdis, ke por indiki la tuton de tiuj elpaŝoj de la Eklezio por la religia libereco, historiistoj ĝenerale parolas pri “ostpolitik”. laŭvorte “orienta politiko”. Ĝi do estas la vorto por indiki la diplo-

mation de la dialogo fare de Sankta Seĝo rilate al Sovetunio kaj popolaj demokratioj. Ĉi tiu vorto estis tamen uzata por la unua fojo en alia kunteksto, nome por indiki la politikon de la germana kanceliero Willy Brandt komence de la sesdekaj jaroj por defendi la interesojn de Federacia Respubliko Germanio rilate al Sovetunio. Valoras aldoni, ke por la sovetuniaj aŭtoritatoj, almenaŭ en la sesdekaj jaroj, ĉi tiuj vortoj (“vaticana orienta politiko”) signifis la politikon de Vatikano en la tuto de la internaciaj rilatoj kun Oriento, tio estas la intervenoj de la Sankta Seĝo favore al paco, senarmigo, regionaj problemoj, kiel tiuj de Vjetnamio aŭ de Mezoriento. Eble en malnovaj tekstoj oni trovas ĉi tiun uzon de la vortoj. Historiistoj opinias, ke la unua sukceso de la vaticana “ostpolitik” estis akordo subskribita kun Jugoslavio la 25-an de junio 1966. Ankaŭ la papa elekto de kardinalo Wojtyła estas konsiderata de historiistoj atesto pri la ekster-ordinara karaktero de la vaticana “ostpolitik”: havigi al la Eklezio sufiĉan spacon por vivi.

La orienta politiko konsistis en laŭgrada kaj pragmata rekunligo de rilatoj kun landoj, en kiuj katolikismo estis laŭsisteme silentigita (Bulgario, Rumanio) aŭ suferis periodojn de persekutado (Albanio, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando).

Tuj post la Oktobra Revolucio staris en Ruslando la problemo de la rilatoj Ŝtato-Eklezio. La katolika Eklezio en la cara Rusio havis 16 milionojn da fideluloj, en 5 diocezoj kun 4600 pastroj kaj

---

## Vatikano (1)

4400 preĝejoj. Per la traktato de Versailles plejparto el ili transiris al Pollando kaj baltaj landoj. En Ruslando tiel restis 1 600 000 katolikoj, el kiuj du trionoj estis poloj, dum la aliaj estis blank-rusianoj (bjelorusianoj).

La nova teksto de la rilatoj Ŝtato-Eklezio aprobita de la registaro de la Sovietoj certigis, teorie, konscienc-liberecon al la personoj, kultoliberecon al la Eklezioj, kune kun libereco de kontraŭ-religia propagando por la ateistoj.

Post la paco de Brest-Litovsk (15.12.1917) la situacio en Ruslando fariĝis peza: sur la lando ŝvebis la minaco de malsato kaj de interna milito. Dum pli ol 10 jaroj la Sankta Seĝo - inkluzive de la tiama nuncio en Germanio, Eugenio Paĉelli - serĉis ian "kunvivo-manieron" kun Sovetunio, kun la celo akiri minimumajn vivkondiĉojn por la katolika Eklezio sub la sovetia reĝimo. Izolita disde la mondo kaj malsatanta, Ruslando bezonis ekonomiajn helpojn kaj internacian agnoskon. Por ambaŭ temoj, tre komplikaj el diplomatia vidpunkto, la tiama Papo Benedikto la 15-a, kvankam fora el la scenejo de la eventoj, estis la persono, kiu havis plej fidindajn informojn por kompreni la situacion, ĉar li havis du observantojn, kiuj konis Ruslandon: mons-ron Achille Ratti (estonta Pio la 11-a) en Varsovio kaj mons-ron Eugenio Paĉelli (la estonta Pio la 12-a) en Munkeno. La unua sukcesis paroli per telefono dufoje kun Lenin por aktivigi lin por la liberigo de kaptita monsinjoro Ropp: mons-ro Paĉelli travivis la tagojn de la povo-kapto fare de sovietanoj en Munkeno (lia loĝejo estis eĉ invadita de

la armitaj revoluciuloj) en 1919. La pritakso sendita de la du diplomatiuloj estis malpozitiva koncerne la diplomatian agnoskon kaj Romo ne rekonis oficiale la novan registaron. Tamen, koncerne ekonomian situacion, respondante al la alvoko lanæita de Maksim Gorkij kaj de la moskva metropolito Tikhon, Benedikto la 15-a certigis sian pretecon helpi la loĝantarojn trafitajn de malsatego. Oni sendis 12 pastrojn, kiuj devigis sin eviti ĉiuspecan religian manifestacion, eĉ mescelebron. Ili restado daŭris preskaŭ 20 monatojn. 500 asisto-centroj disdonis dum tiuj 20 monatoj nutrovarojn senditajn de la Papo: oni satigis ĉiutage preskaŭ 150 mil personojn. La posteulo de Benedikto la 15-a, Papo Pio la 11-a, post hezito, forta je sia diplomatia sperto en Litovio kaj Pollando (inter 1917 kaj 1920), rezignis je la ideo intertrakti konkordaton kun Sovetunio favore al la katolikoj kaj aparte de la tiel nomataj "uniatoj" de Ukrainio. Sed la Sankta Seĝo neniam ĉesis serĉi vojojn, tra kiuj oni povus starigi dialogon kun la ortodoksaj kaj sovetiaj aŭtoritatoj, kaj tio estis ĉefe la celo de la misio konfidita al mons-ro D'Herbigny en la tridekaj jaroj. Li konsekris rusajn episkopojn kaj havis kontaktojn kun lokaj pastroj. Bedaŭrinde li ne multe klopodis kaŝi sian agadon, kaj sekve du el la episkopoj de li konsekritaj estis deportitaj al koncentrejoj, kaj multaj pastroj, kun kiuj li havis kontaktojn, estis arestitaj.

Kun la tiel nomataj “stalinaj elpurigoj” komenciĝis drasta kontraŭkatolika persekuto. Plej granda parto de la pastroj kaj episkopoj estis enkarcerigita kaj murdita. En 1930 oni aranĝis publikajn preĝojn por la viktimoj de komunismo. La 2-an de februaro 1931, kun la invito de Pio la 11-a preĝi por Ruslando, la Sankta Seĝo definitive metis ferman punkton. Stalin, per la nova kontraŭreligia leĝaro, devigis al tio la Papon.

En sia encikliko “Quadragesimo Anno” (verkita okaze de la 40-a datreveno de la sociala encikliko Rerum Novarum) Pio la 11-a plifortigis kritikojn kontraŭ komunismo, evidentigante gravajn maljustaĵojn kaj substrekante la respondecojn de tiuj, kiuj pravigis ilin. Ses jarojn poste, en 1937, Pio la 11-a kondamnis pli solene komunismon per encikliko “Divini Redemptoris” (aliaj vortoj de kondamno por la komunista ideologio estas en encikliko “Acerba animi” (1932), kiu kritikis la troigojn de la meksikia registaro). Pio la 11-a ne nur kondamnis, sed starigis en Romo “Russicum”, stud-instituton por katolika kulturo en la rusa.

La dua mondmilito kaj la malvarma milito estigis timegon pri bolŝevismo kaj la Sankta Seĝo alprenis “atlantikan” politikon (oni ne povas silentigi la fakton, ke aparte en tiuj postmilitaj jaroj komunismo en okcidenta Eŭropo karakteriziĝis per strikta materiismo kaj rigora dependo de Moskvo, tio estas de Stalin). Pio la 12-a invitis la kredantojn elekti okcidentan civilizon, kvankam konscianta pri la limoj ligitaj kun la kapitalisma konceptado de la ekonomio. La kondamno de la komunista ideologio okazis en

1949 per dekreto de la Sankta Ofico, kies pretigio estis pli frua. Oni substrekis la religian (ne politikan) aspekton de tiu kondamno. La titolo de la dekreto estis “ekskomuniko de komunistoj”. La persekutitaj Eklezioj alprenis la nomon de Eklezioj de la Silento. La komunikadoj kun Romo estis tre maloftaj aŭ neekzistantaj. Multnombraj diocezoj fariĝis vakantaj aŭ regataj de kapitulata vikario nomumita sub ŝtata kontrolo; la nombro da seminariejoj ege malkreskis kaj ankaŭ ili estis kontrolataj de la ŝtato. Ordenoj kaj religiaj kongregacioj estis nuligitaj (oni ĵus memorigis la 50-an datrevenon ekde la likvido de religiaj ordenoj en Ĉeĥoslovakio). Kun la escepto de Pollando, la paŝtista instruo estis submetita je strikta kontrolo de la ŝtataj funkciuloj; la plej eminentaj reprezentantoj de la hierarkio (mons-ro Stepinac en Zagrebo, kardinalo Wyszyński en Varsovio, kardinalo Mindszenty en Budapeŝto, mons-ro Beran en Prago) estis enkarcerigitaj, akuzitaj aŭ deportitaj kun la celo “malkreskigi kaj humiligi la spiriton de la katolikaj komunumoj”. La pristudo de la speco de diplomatiaj startigenda rilate al popolaj demokratioj kaj ĉefe rilate al Sovetunio ekaperis dum la lastaj jaroj de la regado de Pio la 12-a: oni komencis paroli pri principo de devo-misio rilate al la Eklezioj de la Silento, kiu implicis fare de la Sankta Seĝo “multajn intertraktojn, iniciatojn, klopodojn”. Unuajn paŝetojn pristudis la tiama helpanto en la ŝtatssekretario, mons-ro Montini, la estonta Paŭlo la 6-a. (daŭrigota)

## KALENDARO 2001

12/19.5. 53-a IFEF-kongreso Tábor  
26.5. Cent jaroj de EK Brno  
14.-20.7. OSIEK Strážnice

### Jak platit svazu

#### Variabilní symboly pro platby ČES

311YYXX úhrada expedice Libroserva (YYXX  
doplněno vedoucím Libroserva)

6043 předplatné Starto bez členství v ČES

0668 dary svazu

6940 členské příspěvky ČES

6941 členské příspěvky UEA

50100 sekce mládeže

50200 sekce šachistů

50400 sekce pedagogická (včetně ILEI-IPR)

60xxx subkonta klubů (koncové číslo pro  
každý klub odlišné)

80200 ediční fond

80300 propagace E-a v regionálním tisku

80400 fond Tilio

80500 ediční fond Anny Milatové

10007 7. konference ČES Znojmo, 2000

80500 Ediční fond Anny Milatové

Variabilní symbol je nezbytný pro správné určení a zaúčtování platby. Při jeho vpisování do příslušné rubriky poštovní poukázky doplňte zprava nulami. Pro vypisování poštovních poukázek typu A-V používejte psací stroj nebo černou propisovací tužku (event. černý tenký popisovač). Poukázku čitelně vyplňte v obou dílečkách, nezapomeňte na rubriku odesílatel. Na těchto poukázkách byla zrušena *Zpráva pro příjemce*, nelze tedy vpisovat žádná sdělení.

Platby s použitím příslušného variabilního symbolu můžete též provést složením hotovosti v kterékoliv pobočce Komerční banky a.s. na svazový účet č. 3330-021/0100, konst. symbol 0379.

Vždy uveďte v příslušné rubrice jméno složitely - tedy jméno svoje, případně osoby, jejímž jménem platbu provádíte. Jednotlivci uvedou příjmení a místo bydliště (NOVÁK PŘEROV), kluby zkratku "EK" a sídlo (EK PŘEROV). Zásadně prosím **nevypisujte celý název**, např. Klub esperantistů, místní pobočka ..., na výpisu se nám pak objeví omezený počet znaků - *Klub esperantist*, při cca 50 klubech v ČR je pak obtížné a často nemožné zjistit odesílatele.

Pro platby bankou ze svého účtu na účet svazu postupujte obvyklým způsobem.

### EL POPOLA ĈINIO

populara ĉina gazeto, konata kiel la plej bela Esperantlingva periodaĵo, ne plu ricevis ŝtatan subvencion kaj tial ĝi aperos nur en la interreto: [www.china.org.cn](http://www.china.org.cn)

**Abonoj de gazetoj:** Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, tel. 0631/332 278, fakso 0631/332 507, elektronika poŝto: [vlada\\_hasala@iol.cz](mailto:vlada_hasala@iol.cz)

*Amikeca Reto (FR, 105 Kč), Esperantisto Slovaka (SK, 200), Eventoj (HU, 668), Heroldo (CH, 540), Informilo de AEH (CZ, 100), Interligilo de IPETA (BG, 110), Juna Amiko (HU, 130), Komencanto (RU, 409), Kosmos (DK, 204), La Gazeto (FR, 550), La Kancerkliniko (FR, 443), La merkato de IKEF (BE, 376), La Migranto (NL, 90), La Ondo de Esperanto (RU, 542), La Verda Lupeo de ELF (DE, 392), Literatura Foiro (CH, 505), Litova Stelo (LT, 362), Monato (BE, 561), La Jaro (BE, 164), Monda Solidareco (FR, 171), Ondo da Vero (TG, 555), Oomoto (JP, 250), OSIEK (135), Penseo (CN, libervola), RET-Info (HU, 429), Scienco kaj kulturo (RU, 455), Sennaciulo de SAT (FR, 530).*

Odesílatel:

Český esperantský svaz  
c/o Pavel Polnický  
Lesní 150/VI  
290 01 Poděbrady

**Internet:** [cea.polnicky@quick.cz](mailto:cea.polnicky@quick.cz)

[www.kuk.cz/cea/](http://www.kuk.cz/cea/)

☆ **STARTO** ☆

Periodikum Českého esperantského svazu (31. ročník)

Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

[starto @ clavis.cz](mailto:starto@clavis.cz); [www.clavis.cz/starto](http://www.clavis.cz/starto)

Členská evidence a změny adres: Pavel Polnický, ČES

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (31-a jarkolekto)

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 9 eŭroj (se aŝpoŝte: + 2 eŭroj)

Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, e-mail: [starto @ clavis.cz](mailto:starto@clavis.cz); [www.clavis.cz/starto](http://www.clavis.cz/starto)

Presis: OPATISK Opava

Podávání novinových zásilek povoleno

Českou poštou, s.p., Odštěpným závodem Severní Morava,  
č.j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

ISSN 1212-009X



# **NOVINOVÁ ZÁSILKA**

Poštovné hrazeno v hotovosti  
u pošty 746 01 Opava 1